

Edmond Privat : *Interpopola Konduto*, 13-a parto
Konkluda ĉapitro

Claude Gacond, 385-a radioprelego, 1971.02.24 & 27

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni legis al vi erojn el la *Konkludo* de la verko *Interpopola Konduto* de Edmond Privat. Vi povis konstati, ke tiu konkludo estas speco de sentencaro, kie Edmond Privat esprimas siajn personajn konstatojn. Al ĉiu parto li trovis titolon. Tiujn titolojn li listigis komence de la ĉapitro. Por faciligi al vi la komprenon de la citaĵoj, ni ĉiam mencias ilian titolon.

A.- Jen observoj de Edmond Privat pri la temo **Nacia honoro**. *Kiel nacian honoron oni adoras daŭre la egoismon de la grupo kaj la fieron de la lasta rebato, kiel knabeto la plej malsaĝa.*

Cl.- *Por kunvivi pace, necesas tute alia honorsento. Lojale plenumi promeson, digne malŝati venĝon, esti la unua, kiu rezignas regi la ceterajn aŭ ilin timigi perforte, jen honoro pli taŭga kaj inda je kulturnacio.*

A.- Kaj jen meditindaj diroj de Edmond Privat pri la temo **Nomoj kaj vortoj** : *La estonteco apartenos al tiu kredo, kiu preĝos per agoj utilaj al ĉiuj. Kio gravas, tio estas plimultigi la eksperimentojn pri paco kaj justeco. La vortoj mem ne havas eĉ sencon sen apliko viva. [...]*

Cl.- *Kia homo, kia popolo vi volas mem esti? Kian mondon vi deziras kunkrei? Al kia homaro vi sopiras, por tie kunvivi feliĉe kaj egalece? Montru vian ideon per via agmaniero, de progreso al progreso. Jen praktika bazo de tutmonda katekismo por homoj kaj ŝtatoj.*

A.- Kaj nun diro de Edmond Privat pri la temo **Individuaj kaj araj respondecoj** : *Ĝis nun la respondeco de unu homo limiĝis je sia konduto individua. Kolektiva konscienco plivastigos tiujn limojn. Necesos pensi ne nur al unuopaj maljustaĵoj, sed ankaŭ al tiuj farataj are aŭ grupe, kaj al tiuj, kiujn oni profitas, permesante ilin al ceteruloj.*

Cl.- Alia temo : **Milita fervoro kaj paca kvieto** : *Necesos, por organizi pacon kaj justecon, vekti tiom da fervoro kaj oferkapablo, kiom patrujamo tion sukcesis por militoj.*

A.- *Momenton imagu, kiom oni jam atingus per kvar jaroj da simila sindonado sen la buĉado!* [Aludo al la unua mondmilito de 1914-1918.] *Kiel la kristanismo povis konsenti doni sian benon al ĉiaj kontraŭaj nacidefendoj kaj ankoraŭ ne predikis tiun pli urĝan senarman krucmiliton?*

Cl.- Jen fine lasta teksto, kiu bone resumas la penson de Edmond Privat : *Aŭ evoluos patriotismo al ara moralo, kiu igos la nacion kapabla kunvivi en societo, aŭ ĝin anstataŭos alia formo de kolektiva sento, pli favora al paco. Verŝajne ambaŭ emoj apude kreskos kaj, iom post iom ili kuniĝos. Ambaŭ estas nur aspektoj de unu fenomeno viva. (Fino de la citaĵoj.)*

A.- De la komenco de decembro 1970 ĝis hodiaŭ ni dediĉis nian atenton al unu sola verko de Edmond Privat. Vi povis konstati, kiom riĉa je meditado ĝi estas. Vi rimarkis, kiom aktuala restis tiu observado pri la *Interpopola Konduto*.

Cl.- En nia esperanto-literaturo tiu libro de Edmond Privat okupas interesan lokon. Ĉu ĝi estas traduko el la franca verko *Le Choc des patriotismes* [La koliziado de la patriotismoj] aŭ ĉu ĝi devas esti konsiderata kiel originalaĵo? Fakte Edmond Privat unue verkis *Le Choc des patriotismes* en 1931, kaj en 1934 li redaktis la esperantan tekston. Tiu esperantigo parte estas traduko, parte estas reverkado.

A.- Ni konsideras la tuton, tio estas ambaŭ verkojn, la francan kaj la esperantan, kiel originalaĵon, kiu tipe respiegulas priokupojn proprajn al nia movado. En la averto Edmond Privat fakte skribis :

Edmond Privat : *Interpopola Konduto*, 13-a parto

Konkluda ĉapitro

Claude Gacond, 385-a radioprelego, 1971.02.24 & 27

Cl.- *Kiu de l' frua knabeco jam aŭdis la homaranajn alvokojn de Zamenhof kaj observis la kontraston kun kruda realo, tiu neniam povis forlasi temon konstante sin trudinta al observemo.*

A.- Dank'al esperanto Edmond Privat lernis, kiel li diras, *eliri el si mem kaj rigardi la mondon, ŝanĝante lokon en ĉiu momento.*

Cl.- Edmond Privat ankoraŭ diras : *Por ekvidi [la moviĝantan realon ĉirkaŭ si], necesas turni konstante la binoklon kaj rigardi per ambaŭ flankoj.*

A.- Tiun sintenon akiris Edmond Privat nek pro familia influo. Li naskiĝis en burĝa medio, kie ne abundis la komprenemo por la ceteraj medioj. Tiun sintenon li nek akiris pro lerneja influo. La tiama instruado estis tro unilatera. Verŝajne tiun sintenon li ekkulturis kun sia kamarado Hector Hodler, dank'al ilia komuna esperanto-funkcio.

Cl.- Plenumante sian redaktoran laboron por gazeto, kiu provis kunligi gejunulojn en la tuta mondo, Edmond Privat kaj Hector Hodler pli kaj pli konscie komprenis, ke super la naciaj plafonoj bluas tuthomara ĉielo.

A.- Kaj la vortoj de Zamenhof en Bulonjo-sur-Maró :

Cl.- *« En Bulonjo-sur-Maró kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj »*,

A.- tutcerte definitive forblovis la lastajn nubojn, kiuj kaŝis antaŭ iliaj okuloj la koloron de la tutmonda ĉielo. De tiam, ambaŭ junuloj ne ĉesis proklami la neceson preferi la mond-civitanecon al la limigita nacia civitaneco okaze de konfliktoj inter ambaŭ civitanecoj, sed samtempe ili provis harmoniigi ambaŭ mistikojn. Jen filozofia sinteno tipe esperantisma.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-